

Protokolo de la komitatkunsido en Ĉaĉak, okaze de la 52-a Kongreso de ILEI

2019.07.14 - 16

Ĉeestis: dekomence 15 personoj.

Tagordo.

1. Bonvenigo
2. Akcepto de dokumentoj pri anstataŭigo de komitatanoj
3. Elekto de protokolantoj
4. Informo pri la kvorumo.
5. Decido pri maksimuma nombro de voĉoj ĉe unu persono.
6. Definitivigo de la tagordo.
7. Konfirmo de la aprobo de la protokolo de la madrida kongreso (videbla en la retejo www.ilei.info, jam aprobita rete)
8. Resumo kaj konfirmo de komitataj decidoj en Madrido.
9. Starigo de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.
10. Proponoj por Honoraj Membroj : Xiaofeng GONG « Arko » kaj Jozefo NÉMETH.
11. Informoj pri la laboro de la estraro.
12. Informoj pri la programo Eo Instruista Trejnado (EIT)
13. Informo pri evoluo de niaj sekcioj.
14. Raporto pri la laboro de la komisionoj.
15. Decido pri modifado de tri regularoj: Honora Membreco, Kongresoj, Retaj voĉdonoj.
16. Informoj pri subvencioj por la Kongreso.
17. Ceteraj diskutendaj punktoj kun la estraro. Propono de la sekcioj (La nederlanda sekcio proponas kreon de laborgrupo pri leksiko)
18. Prezento kaj diskuto de la Jarraporto 2018
19. Prezento kaj voĉdono pri la financa raporto pri 2018.
20. Voĉdono pri la jarraporto pri 2018 kaj senŝarĝigo de la estraro.
21. Informoj pri la Kongresoj 2020 kaj 2021.
22. Opinioj de komitatanoj pri gravaj taskoj kaj strategioj por la nova periodo.
23. Buĝeto por la jaro 2020
24. Aŭskulto de raportoj de eventualaj dumkongresaj komisionoj.
25. Ideoj kaj proponoj por la jaroj 2020-2021
26. Diversaĵoj

Protokolo

La punkto 1. Bonvenigo

La komitatkunsidon malfermis la Prezidanto Mireille Grosjean per salutado kaj bonvenigo.

La punkto 2. Akcepto de dokumentoj pri anstataŭigo de komitatanoj. Partoprenis 15 personoj. Radojica Petrovic, Elena Nadikova, Karine Arakeljan, Unika, William Harris, Mireille Grosjean, Stefan MacGill, Aurora Bute, Marc Cuffez, Rob Moerbeek, Mihai Trifoi, Nina Danylyuk, Duncan Charters, Didier Janot, Xosé Conde kaj Zhang Wei partoprenis kiel anstataŭantoj sen havi propran voĉon.

Okazis esploro pri kvorumo kaj akcepto de la dokumentoj pri anstataŭigo de komitatanoj. Entute la komitatkunsido havas voĉojn por la landoj: Koreio – 2, Ĉinio – 2, Hungario- 3, Svislando – 2,

Japanio – 3, Francio – 3, Rusio – 1, Armenio – 1, Belgio – 1, Nederlando – 1, Rumanio – 2, Usono – 2, Ukrainio – 1, Serbio – 1, Katalunio – 1. Entute 26 voĉoj.

El Ĉinio: Zhang Wei havas la voĉon de “Arko” Gong Xiaofeng kaj de Ju Jianchao.

El Francio: Didier Janot havas la voĉon de Michel Déchy kaj de Jérôme Caré.

El Hungario: Stefan MacGill havas la voĉon de Jozefo Német, de Katalin Kovats kaj la sian.

El Katalunio Xosé Condé havas la voĉon de Ruben Fernandez Asensio.

El Koreio: Dianto havas la voĉon de “Jesa” Lee Hyon Suk kaj de “Nema” Park Yong Sung.

El Japanio : « Unika » havas la voĉon de Ueno Yuniko, de Ishikawa Tiekio kaj la sian.

El Svislando : Mireille Grosjean havas la voĉon de Charles Roduit kaj la sian.

Entute 26 voĉoj.

La punkto 3. Elekto de protokolantoj.

Okazis elektoj de la protokolantoj. Per voĉdonado estis elektitaj du personoj: Rob Moerbeek kaj Elena Nadikova. Decidite. Unika kalkulos la voĉojn. Ŝi memorigis, ke parolantoj menciis sian kongresnumeron por la protokolo. Tamen tio ne ĉiam realiĝis.

La punkto 4. Informo pri la kvorumo.

La kvorumo (23 voĉoj) estas atingita.

Punkto 5. Decido pri maksimuma nombro de voĉoj ĉe unu persono.

Sekvis voĉdonado, ĉu maksimumo de voĉoj estu 4. Ĉiuj poris. Decidite. Do, ĉeestas entute 3-oble – 3, 2-oble – 5 kaj 7 po unu voĉo, t.e. 26 voĉoj de 14 sekcioj.

Punkto 6. Definitivigo de la tagordo.

La tagordo per 26 jesoĵ estis akceptita. Mirejo rete sendis ĝin antaŭ la Kongreso. Plie ŝi sendis tri Regularojn por la kunsido kaj unu proponon de NGGE (Nederlanda sekcio).

Punktoj 7- 8. Konfirmo de la aprobo de la protokolo de la madrida kongreso. Resumo kaj konfirmo de komitataj decidoj en Madrido.

La protokolon de la madridaj kunsidoj la Komitato jam rete konfirmis. Nun laŭregule okazas la formala voĉdonado en ĉeesta kunveno kaj konfirmo de la decidoj. Por – 25 voĉoj, sindetenis 1. La protokolo estas konfirmita.

Decido: konfirmi la aprobon de la protokolo de la madrida kongreso kaj ĝiaj decidoj.

Punkto 9. Starigo de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.

Laŭ la peto de Trezoro Radojica proponis starigi la dumkonferencan komisionon pri Unesko-Kuriero. Trezoro pledas menciigi la regulan aperadon de la Unesko-Kuriero. Mirejo informis pri tiu

tre valora agado. Ŝi substrekis, ke, ekzemple, ILEI subtenas Esperanto-Sumoo-n kaj tio helpas al ĝia gvidanto Hori Jasuo. ILEI devas same subteni Trezoron, ĉar nun okazis kelkaj problemoj ĉe li. Iuj jam uzas la materialon por lecionoj kaj IPR frontpaĝe montris tian uzon. Stefan MacGill informis, ke UEA iom subtenas Trezoron, tamen necesas ankoraŭ helpo.

Dumkongresa komisiono pri Rezolucio povas utili por niaj rilatoj kun Unesko. Estas decidite pri starigo de tiu komisiono. Ĝin eniris Radojica Petrovic, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. La tekston kompilos Rob Moerbeek kun Duncan Charters.

Mirejo memorigas, ke ŝi tenas kontakton kun la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Audrey Azoulay, de post la peto pri aliĝo de ILEI kiel kunlaboranta NRO (2016). Ni atendas reagon.

Menciindas apogo al la Kantfestivalo en Wroclav, Pollando, konforma al la klerigaj celoj de ILEI.

Punkto 10. Proponoj por Honoraj Membroj : Xiaofeng GONG « Arko » kaj Jozefo NÉMETH.

Mirejo informis pri la stato de honorigo de membroj, rakontis pri meritoj de ambaŭ kandidatoj: s-ino GONG Xiaofeng (Arko) estis vicprezidanto de ILEI dum 6 jaroj, enorme laboris por la ĉina sekcio, kiu estas la plej granda en la Ligo.

Jozefo NÉMETH redaktas jam la 100-an numeron de IPR, laboras en la hungara sekcio de ILEI, kiu same estas unu el la plej multnombraj.

Voĉdono okazis bloke por ambaŭ kandidatoj. Por estis 26 voĉoj: unuanime nomumitaj.

Decido: nomi Xiaofeng GONG (Arko-n) kaj Jozefon NÉMETH Honoraj Membroj de ILEI.

Punkto 11. Informoj pri la laboro de la Estraro.

Mirejo informis pri la estrarkunsido de ILEI en Les Brenets, Svislando, januare 2019. Ĉeestis 3 estraranoj, aliaj partoprenis ĉiutage skajpe. Partoprenis la observanto de UEA Stefan MacGill. Estis ellaboritaj modifoj por kelkaj gravaj dokumentoj de ILEI, inkluzive la Statuton. Ili devas esti diskutitaj dum la komitatkunsido kaj aprobitaj. Se tio ne okazos en Ĉaĉak, ili devos esti submetitaj al la Komitato per reta voĉdono aŭ prokrastiĝi ĝis Kanado en 2020.

Ŝi raportis ankaŭ pri prilaboro de dokumentoj de Hector Hodler, trovitaj en Ĝenevo en la arkivo de lia vidvino. La laboro komenciĝis en julio 2018. Mirejo klopodas trovi solvojn perante inter la Movado kaj la respondeculoj de la Arkivo.

Poste la Prezidanto rakontis pri kelkaj aliaj atingoj de la Estraro. Ŝi substrekis, ke 4 el 7 estraranoj aktive laboras profesie kaj, sekve, estas multe okupitaj en sia kutima vivo. Do, la Estraro laboras laŭ siaj fortoj.

Punkto 12. Informoj pri la programo Eo-Instruista Trejnado (EIT).

Mirejo informis pri la nuna stato de EIT. Estis lanĉitaj tri programoj. Estas 1 sukcesinto, 3 homoj el Burundo daŭrigas sian studadon, el ili 2 lernas tre diligente kaj serioze. Verŝajne la postuloj estas tro pezaj. Certe, en Afriko oni havas alian instruan kutimon. Mirejo en Burundo prijuĝos la instruadon. La Estraro faris specialan buĝeton por afrikanoj. Por 2020 estas planata vojaĝo de Mirejo al Dakar por ekzameni senegalanojn surloke kaj tiel malaltigi la buĝeton kaj faciligi por afrikanoj la sukcesan finon de sia studado.

Kiel ajn, necesas reformi la rapidkurson por instrua kapabligo.

Poste okazis diskuto pri manieroj instrui Esperanton en diversaj mondopartoj. Mirejo rakontis pri sia sperto, Unika substrekiis la diferencon inter instrumentoj en Eŭropo kaj Azio. Necesas pridiskuti diversajn spertojn por kompreni, kiel trejni instruistojn.

Xose Conde el Katalunio rimarkis, ke ni uzas precipe konservativajn metodikojn. Duncan Charters havas priskribon de sia metodo en sia komputilo.

Siajn opiniojn esprimis aliaj komitatanoj: Karine Arakeljan, Rob Moerbek, Mihai Trifoi, Mirejo Grosjean. Elena Nadikova proponis okazigi rondan tablon pri instruado kun interŝanĝo de diversaj interkulturaj spertoj. Kaj meti tiun aranĝon en la programon ĉi-kongrese kaj al la sekva. Decidite.

Punkto 13. Informo pri evoluo de niaj sekcioj.

Mirejo informis pri la svisa sekcio. Stefan MacGill faris ĝeneralan raporton pri la nuna situacio kun sekcioj. Ni havas 43 sekciojn kaj 800 membrojn en 70 landoj. El la 43 sekcioj pluraj ne plu reagas, eble forstrekendaj. Estas 4 sekcioj, kiuj tute ne respondas. Ne funkcias: en Aŭstralio (sekcio), Slovakio (reprezentanto, plu laŭ teksto – rp), Portugalio (kontaktpersono, plu – kp), Srilanko (kp), Haitio (kp).

Ankoraŭ ne esprimis sian konsenton pri la publikigo de iliaj nomoj kaj adresoj en nia retejo 15 sekcioj: BJ, BG, BI, CN, FR, ES, Kat, CU, MX, NP, NO, ZA, SE, TG, VN; 7 reprezentantoj: GB, CL, NE, PK, RU, TJ, UY; 6 kontaktpersonoj: BO, BH, KE, CR, NK, VE.

Stefan MacGill vaste alvokis pri datumoj rilate al la postuloj pri privateco. Mencion de adresoj de kontaktuloj malfaciligas la nova eŭropa regulo pri privateco: multaj ne volas, ke aperu ilia adreso. Stefan rete sendos la rezulton al la komitatanoj.

Estas decidite, ke ni devas kontakti filipinanon, kiu estas aktiva kaj povos, eventuale, ion ŝanĝi rilate al sekcia agado.

Konkludo: ni devas pli detale sekvi la agadon de la sekcioj, helpi ilin. Estas multe da malfacilaĵoj, diversaj situacioj, kaŭzoj, kiujn ni devas priesplori. Necesas aldoni poŝtajn adresojn al la alvoko pri la konsento.

Punkto 14. Raporto pri la laboro de la komisionoj.

Mirejo informis pri komisiitoj kaj komisionoj ene de ILEI. Ĝis nun oni konsideris kelkajn komisionojn: la elektan, la kontrolan, la lernejan, la ekzamenan, la terminaran, la regularan, la universitatan. ILEI en la lastaj jaroj nomumis diversajn komisiitojn. Tamen la Statuto kaj Interna Regularo permesas nur du komisiitojn. Por ripari tiun nekongruon, se ne ŝanĝi la Statuton kaj Internan Regularon, eblas uzi la terminon “prizorganto”; plie ni povus distingi komitatajn (esencajn) disde estraraj komisionoj (organizaj).

Mirejo proponis, ke estu du komitataj – la financa kaj elekta - komisionoj. La lastaj estas organizaj komisionoj. Ĉefas, ke la komisionoj aktivu.

Plie estas komisiitoj. S-ro Ralph Schmeits estas oficisto de UEA en la Centra Oficejo. Stefan informis pri situacio kun komisionoj en UEA, el kiuj multaj ne funkcias.

Inter la laborkomisionoj de ILEI: la kontrola komisiono ankoraŭ ne kontrolis niajn kontojn. La lerneja Komisiono dormas. La regulara prilaboris kelkajn gravajn dokumentojn, kiuj devas esti aprobitaj, dezirinde ĉi-kongrese. La universitata komisiono havas 11 personojn. Kreiĝis subgrupo, kies motoro estas Vicente Manzano Arrondo (Viko) el Hispanio.

Estas problemo pri la scienca komitato de IPR, kies laboro ne kongruas kun la aperritmo de nia organo.

Punkto 15. Modifado de tri regularoj: Honora Membreco, Kongresoj, Retaj voĉdonoj.

La Komitato traktis nur la regularon pri nomumado de Honoraj Membroj. Mirejo klarigis ĉiujn modifojn. En la enkonduka parto: skriba formo signifas paperan aŭ elektronikan formon. Per voĉdono la propono estis unuanime akceptita. Aliaj modifproponoj: priskribo de biografio aŭ biografia priskribo. La tria propono: skriba biografio.

Okazis diskuto pri tiuj modifproponoj kaj voĉdono : por priskribo de biografio – 8 voĉoj, biografia priskribo – 11, skriba biografio – 1 voĉo.

Akceptita la frazo «biografia priskribo».

Sekvis diskuto pri aliaj punktoj de la Regularo. La punktoj 8 kaj 9 estis unuanime akceptitaj.

Alia propono: pri bezono de komisiono por honorigo. Laŭ la voĉdono, kontraŭ la kreo de komisiono estas 17 voĉoj. Akceptite.

Por la atingita versio de la Regularo estis 19 voĉoj. Tamen pro nekvorumo de la Komitato ĉi-tage la regularo ne estis valide aprobita kaj iros al reta voĉdono.

La aliaj modifoj de regularoj kaj statutoj ne povis okazi pro manko je kvorumo.

Punkto 16: Informoj pri subvencioj por la Kongreso. Ne venis.

Punkto 17. Propono de la nederlanda sekcio krei laborgrupon pri leksiko.

Raportis Rob Moerbeek. En PIV estas evitendaj vortoj kaj arkaismoj, necesas krei laborgrupon por kontroli tion kaj doni klarajn konsilojn al la instruistoj. La posedantoj de la aŭtoraj rajtoj de PIV permesis tion (Claude Roux). Ni devas trovi homojn. Povas esti akademianoj, anoj de la ekzamenaj komisionoj. Estas decidite starigi la laborgrupon. Ĝin eniros Karine Arakeljan kaj Unika kaj la grupo alvokos homojn kunlabori.

Punkto 18: Prezento kaj diskuto de la Jarraporto 2018. La prezidanto mencias la kutimon raporti pri tri monatoj regule tra la jaro. Tiuj raportoj aperas en la retejo de ILEI.

Punkto 19. Prezento kaj voĉdono pri la financa raporto pri 2018.

Mirejo raportis pri la budĝeto de ILEI, pri financaj problemoj (ekz, kun *Juna Amiko JA*). Necesas alvoki por donacoj. Stefan proponis aktivigi varbadon. Li pretas prizorgi tion.

Sekvis aprobo de la financa bilanco per 14 jeso, sen estraranoj kaj sen kvorumo.

Punkto 20 : Voĉdono pri la jarraporto pri 2018 kaj senŝarĝigo de la estraro. Tio ne povis okazi pro manko je kvorumo.

Punkto 21 : Informoj pri la KOngresoj 2020 kaj 2021. La prezidanto ripetas la informon, ke ILEI kongresumos en 2020 en Kebekurbo, Kanado. Plie pri 2021, pro la fakto de UEA decidis lanĉi UK-on en Belfast, ILEI esploras en Skotlando.

Punkto 22. Opinioj de komitatanoj pri gravaj taskoj kaj strategioj por la nova periodo.

Venis jenaj proponoj :

- 1) Necesas pli aktive kontakti TEJO-n por stimuli gejunulojn akiri novajn instruistojn. Okazigi TEJO-seminariojn.
- 2) Okazigi kursojn pri Esperanto, pri lertigado de instruistoj dum la junularaj aranĝoj (kaj aliaj, aktivigi projekton *Flugiloj de malfacila vento* – tre dezirinde dum SES), profiti de spertaj instruistoj por seminarioj por lertigado.

- 3) Vaste anonci pri Poznan, lertigado por instruistoj en UAM – pri la lasta eblo – tra ĉiuj kanaloj de ILEI, TEJO.
- 4) Pro ĉeso de Poznan organizi propran lertigadon de instruistoj – estas urĝa afero. Por tio krei liston de spertaj instruistoj por lertigado el diversaj kontinentoj (ekz, demandi Arkon, KAEM).
- 5) Propono de Stefan : ILEI posedas grandan stokon de la kajero «*Tendaraj Tagoj*» dua kajero (ĉirkaŭ 700 ekzempleroj). Ili ne povas esti vendataj solaj. Necesas nur reeldono de la 1-a kajero por poste vendi ilin kune. Esplorenda afero.
- 6) *Esperiga Komunikado* EKO (komuna informilo de UEA, ILEI, TEJO) daŭru.

Ĉiuj proponoj estas akceptitaj.

Punkto 23: Buĝeto. Ne traktita.

Punkto 24: Prezento de la rezolucio. Rob Moerbeek laŭtlegis verkitan de li projekton de Rezolucio de la 52-a kongreso de ILEI. Ĝi estis unuanime akceptita kaj aplaŭdita.

Punkto 25: Ideoj kaj proponoj por la jaroj 2020 kaj 2021. Ne venis.

Punkto 26. Diversaĵoj

Mirejo memorigis, ke necesas solvi la problemon kun ISBN por ILEI.

Ŝi konstatis kiel status la analizo de lernolibroj, kaj tio aktualas. Stefan aldonis, ke ILEI jam faris tion en 1990, tamen necesas renovigi la analizon. Gravas alvoki universitatojn al tiu laboro.

Aperis demando, ĉu ekzistas iu rezulto de la lasta Tago de Lernado en Lisbono.

Mirejo klarigis, ke estos disdonataj 1000 ekz. de JA en Lahti por ĉiuj partoprenantoj. Same jam okazis dum BET-2019 kun 400 partoprenantoj.

En 2016 estis sendita oficiala letero al Unesko. Ĝia direktorino ankoraŭ ne respondis.

Okazis diskuto pri la aspekto de la membrokarto: unu flanko sama por ĉiuj, alia – depende de la bezonoj de la sekcio. Unika aldonis, ke ŝi jam pretigis modelon. Ĝi ne devas esti libere elŝutita. Necesas finprepari la aferon.

Mirejo informis pri la neceso esplori pri la evoluo de la instruado de Eo en UNED en Madrido.

Ŝi alvokis legi regularojn sur la paĝoj de ILEI www.ilei.info.

La Komitato en Ĉaĉak kunvenis en tri sesioj, kvorumo estis atingita nur en la unua sesio.

Protokolis la Sekretario de ILEI: Elena Nadikova (kun kontribuo de Rob Moerbeek, Mireille Grosjean, Duncan Charters).

2019.08.22